

Heinrich Heine,

En admirinde bela  
maj'

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

En admirinde bela maj',  
dum jam burĝonoj krevis,  
jen ankaŭ miakore  
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',  
dum birdotril' senbridis,  
jen mi al si sopirojn,  
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-203-431 (2004-03-24  
07:33:04)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta sanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.*

Heinrich Heine,

En la mirida bela  
Maj'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj',  
dum sin burĝonoj fendis,  
en mia kor' la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',  
dum birda tril' ne ĉesis,  
al si sopiron mian  
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaločajo, \*1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26  
12:08:05)

Heinrich Heine,

En dolĉega Maj'

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum la burĝonoj krevis,  
El mia koro ĝerme  
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',  
Dum birda kanto sonis,  
De l' kora mi sopiro  
Konfeson al si donis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04-03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektronitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*